Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO

Estrara Subteamo: MOVADO

Estrara Komuniko EKO 2014-48 sendita el Budapesto, la 21an de novembro

# Faka resumo de la AMO-seminario en KAEST

En nia antaŭa komuniko ni raportis pri la malfermo de la AMO-seminario en KAEST en la 14a de novembro 2014, kune kun la preleg-titoloj. Sekvas koncizaj resumoj pri la efektive faritaj prezentoj, kaj fine kvino da rekomendoj, kompilitaj dum la pritaksa kaj konkluda sesio. Pli detalaj materialoj foje jam alireblas, la cetero poste haveblos en starigata retejo de AMO, kaj aperos libroforme en la kutima resuma libro de KAEST pri la enhavo de la prelegoj de la tuta aranĝo. La nunaj resumoj aperas laŭ la alfabeta ordo de la familiaj nomoj de la prezentintoj.



## Eva Fitzelová kun Johannes Mueller

**Vojo de podkasta sono**

Enkonduke oni rigardis ilian podkastajn retejojn kaj foton de la registrejo. En la ĉefa sesio estis instalita parto de ilia ekipaĵo kaj la publiko povis vidi kaj aŭdi ilin efektive krei podkaston, kun eblo de intervenoj de seminarianoj. Emfazita estis la bezono de konvenaj registrejoj kaj bonkvalitaj mikrofonoj, por krei rezultojn, kiujn homoj volonte aŭskultos. Eblis vidi ekranege la interfacon de la postredakta programo per kiu ili poluras la rezultojn de registraĵoj. Oni skizis la nuntempajn regulajn kreantojn de E-podkastoj kaj enrigardis iliajn retejojn. La elsendo: http://kern.punkto.info/2014/11/16/kp006-sonregistrado/

## Mélanie Maradan

**De papero al ekrano: optika signorekono (OSR) kaj tekstar-purigado**



La prezento emfazis la tutan procezon kaj ne nur la OSR-paŝon mem. Necesas unue difini la taskon, trovi financadon, arigi, stoki kaj trarigardi la materialon por ne havi surprizojn mezvoje. Post OSR sekvas postpoluro, elekto de eligaj formatoj, indeksado de la rezultoj, aldono de serĉebloj, aldono de konvenaj meta-datumoj kune kun utilaj serĉvortoj, afiŝigo kaj diskonigo.
Fina pritasko de la procezo gravas, por lerni lecionojn por postaj projektoj. Duono de la sesio estis praktika, la 25-persona publiko sidis ĉe komputiloj, rekonigis paĝojn, vidis la rezultojn kaj mem aplikis elŝuteblajn E-lingvajn korektilojn, sekve povis taksi la utilon kaj limojn de OSR-programoj.

## Michal Matúšov (KuboF)




**Vikipedio, vikifontaro, ELiSo**

Post tre rapida rigardo al la baza oferto de la Esperanta Vikipedio (kies lastsemajna stato kun 200.000 artikoloj estis disponigita de KAEST al ĉiu partoprenanto sur DVD, uzebla kiam retaliro mankas aŭ tro malrapidas) ni koncentriĝis pri la engaĝado de Vikipedio en projektoj de GBAM -- Galerioj, Bibliotekoj, Arĥivoj, Muzeoj (angle GLAM) ĝuste por helpi al ili sekurigi kaj konigi siajn kolektojn. Estis prezentita la labor-grupo ELiSo (Esperanto kaj Libera Scio) kiu kunpreparis tiun DVD-on, kaj kiu estas oficiale rekonata de la Fondaĵo Vikimedio (*Wikimedia Foundation*), kiel Vikimedia uzant-grupo.

En la prezento ni eniris Vikifontaron (la E-versio de *Wikisource*) por esplori la manieron stoki skanitajn librojn. Unue indas arigi la unuopajn paĝ-bildojn al unu dosiero – la formatoj DjVu kaj PDF por tio bone taŭgas. La interfaco montras tiujn paĝojn kun apude spaco por ricevi la tekston en serĉebla formato – tipe tiu teksto estas kreita per OSR. Poste kolorportaj paĝbutonoj montras ĉu la paĝbildo jam ĉeestas, ĉu estas teksto kaj ĉu ĝi estas kontrolita aŭ kontrolenda. Tiel pluraj homoj povas kunlabori por pretigi la tekstojn.

## Vladimír Türk



Li prezentis siajn spertojn utiligi komercan produkton pri OSR por akiri el skanitaj tekstopaĝoj redakteblan tekston, kaj helpilojn por bonigi la rezultojn. Post prezento de instrua filmeto li menciis sian preferatan formaton PDF kaj la ĉefan avantaĝon de la programo, nome el multaj bildodosieroj de skanitaj paĝoj, eĉ el tuta skanita libro estiĝas unu PDF dosiero, multege malpli granda, kun funkcianta vortserĉado (se la origina bildo estis sufiĉe kvalita). Dua prezento estis demonstro de simpla apogilo por efikigi la fotadon de libropaĝoj, kio estas alternativo al skanado. Ĝi ebligas ciferecigi dikajn librojn sen difekti ties dorsbindaĵon kaj ankaŭ pli grandajn formatojn ol tiu kutima A4 kiel hejmaj surtablaj skaniloj. La ĉefa temo estis sonprilaborado per la programo *Audacity* – kiel registri, redakti kaj aŭdigi sonojn. Post la enkonduka instrua filmeto, montranta la bazajn paŝojn, nome kiel registri, pritondi kaj konservi la sonon, ni vidis ankaŭ la proceduron por forigi fonan bruon de registraĵo: oni elkopias senparolan parton el la signalo, analizas ĝin por ekscii la ecojn de tiu bruo, kaj poste povas apliki ĝiajn mezurojn al la cetera registraĵo. Multtraka registrado estis klarigita, kaj kiel postmodifi difinitajn tonojn, ekzemple por korekti malĝustan noton en kanto.
Materialoj ĉe: https://drive.google.com/folderview?id=0B6wLbPdCpR0KYWY1U0VtelVtTVU&usp=sharing

## Václav Zouzalík

**Interretaj arĥivoj kaj Krea Komunaĵo**

Reta arĥivado gravas por protekti verkojn kontraŭ pereo kaj konservi ilin por estonto. Ĝi kapablas plikonigi kaj plifamigi verkojn. Flanka utilo estas la montro, ke Esperanto ekzistas, vivas kaj havas historion. Grava stokejo estas Vikifontaro, kiu akceptas skanitajn librojn kaj bildojn ene de la Vikipedia sistemo, tiel ke ili servu al la enciklopedio kiel fontoj kaj referenciloj. Stokado tie bezonas fakajn konojn, necesas manipuli kodojn kaj ŝablonojn kaj indeksi la verkon laŭ sistemaj normoj. Amasa arĥivado estas bremsata de fortaj leĝoj pri

kopirajto. Preter limigitaj kazoj de 'justa uzo', en multaj landoj la protekto povas daŭri ĝis 70 jarojn post la forpaso de la aŭtoro.  Krea Komunaĵo estas organizo, kiu eldonis arojn de licencoj, kiuj ebligas al aŭtoroj sentime liberigi siajn verkojn pli frue, ĉar la aŭtoro kaj la instanco subskribas kontrakton, kiu difinas detale kiuj rajtoj estas fordonitaj kaj kiuj ne. Laŭpete de la nuna komunikanto aŭ la aŭtoro eblas ricevi la du prezentaĵojn en formato PDF (600 KB kaj 1.2 MB).

Ĉiuj fotoj en la dokumento faritaj de Brian Moon el Luksemburgo.



Sube kelkaj partoprenintoj kun la gvidintoj, fotitaj tuj post la fermo. La skribtabulo fone enhavas la seminariajn rekomendojn.



La gvidintoj, supra vico de maldekstro al dekstro: Václav Zouzalík (CZ), Johannes Mueller (DE), Eva Fitzelová (SK), Mélanie Maradan (CH). Suba vico: Vladimír Türk, (CZ), Michal Matúšov (SK) kaj Stefan MacGill (HU/NZ).

La vendreda sesio okazis sen paralelaj programoj en KAEST, tiel ke venis 45 personoj. La aliaj sesioj altiris inter dek kaj dudek kvin partoprenintoj. Por ke la rekomendoj aperu sur aparta paĝo, (kaj estu haveblaj kiel aparta dokumento) ni aldonas bildon de KAEST-anoj dum koridoraj diskutoj. Parolas Petro Balaž, prezentinto de la tema enkonduko por la AMO-seminario



# La rekomendoj el la ferma kunsido de AMO-6

Ĉi tie ni prezentas la rekomendojn de la sesa AMO-seminario, okazinta en Slovakio en novembro 2014, kadre de KAEST, kun ĉeftemo 'Ciferecigo de la Esperanto-kulturo'.
Por ĉiu rekomendo ni difinis la celato(j)n kaj ni poste aldonis koncizan klarigon por ĉiu.

## Rekomendo 1: al UEA

Kunordigi ciferigajn projektojn, bonigi la informfluon por ke facile eblu scii kio troviĝas kaj kie trovi ĝin, kaj kiaj laboroj estas farataj aŭ farotaj.

*Komento:* La tuja rekomendo rilatas al la skanado de libroj kaj revuoj, sed tia kunordigo ege bezonatas tra vasta gamo da teknologiaj kaj organizaj gamoj. La tuja rekomendo venis el pli ol unu okazo, kiam du aktivuloj diversloke uzis tempon skani la saman verkon aŭ revuo-kolekton.

## Rekomendo 2: al UEA kaj nunaj agantoj

Faciligi kunlaboradon en ciferecigaj kaj retaj projektoj – per kreo de klaraj gvidiloj, kiuj celu homojn sen grandaj komputikaj kapabloj – kaj kreo de klaraj vojmontriloj: kiuj projektoj ekzistas kaj kiucelaj ili estas, kaj kiel oni aliras ilin por ekscii, kiel anonci sin.

*Komento:* Tio rilatas al la trajare tenata sopiro starigi retan laborfortan bazaron, kie anoncu sin unuflanke asocioj kaj projektoj kun manko de fortoj, aliflanke homoj volantaj iel ekagi. Tiu bazaro celis kovri ĉiajn terenojn, sed verŝajne ĉefrolus retprojektoj.

## Rekomendo 3: al UEA kaj nunaj agantoj

Decidi pri optimumaj solvoj por diversaj taskoj kaj projektoj kaj fari al la komunumo rekomendojn.

*Komento:* Tio celas liveri pli grandan klarecon pri la oferto, kaj eviti similcelajn paralelajn retejojn kaj projektojn. Ĉia tia raciigo devas esti bone interkonsentita inter la agantoj kaj ne nur desupre dekretitaj.

## Rekomendo 4: al UEA

Helpi al verkistoj solvi problemojn pri kopirajto. UEA donu ekzemplon per simpligo de la pluuzo de siaj propraj dokumentoj (gazetaraj komunikoj k.s.) pere de licencoj de Krea Komunaĵo aŭ simila vojo.

*Komento:* Temus unue per klarigoj pri la nuna situacio en gamo da landoj, due pri ebloj liberigi verkojn por vidigo kaj reuzo per komunaj kopirajtoj, kiuj entenas la eblon permesi aŭ malpermesi diversajn aspektojn de la uzado, inkluzive de tradukado.

## Rekomendo 5: al UEA kune kun spertuloj, i.a. en TEJO

Malfermi eblojn por altiri subvencian apogon por ciferecigaj projektoj aŭ trejnkursoj pri la temo.

*Komento:* En la movado estas homoj spertaj pri subvencipetado, kiuj estus enplekteblaj ankaŭ por retprojektoj.

Modra-Harmonia, Slovakio, 16-an novembro, 2014.